

Kluba Programo:**septembro:**

- 05 Socia Vespero
- 12 Heleno Fantom: *El la Maniko de nia Librobretaro*
- 19 Ian Fantom: *La Puĉo 40 Jarojn poste* (1800h: konsilantaro)
- 26 Socia Vespero

oktobro:

- 3 John Wells: *Lingva Seminario*
- 10 Olga Kerziouk: *Lastaj Novaĵoj el Ukrainio* (1800h: konsilantaro)
- 17 Jadwiga Greger: *Esperanto sur la Strando*
- 24 Socia Vespero
- 31 David Thornell: *Franca Revolucio (dua parto)*

novembro:

- 7 Diskutvespero. Temo: *La Estonteco de Nuklea Energio*

Esperanta Kalendaro:

- 26-29 septembro: Internacia Amikeca Renkontiĝo, *The Friars*, Aylesford, Kent. Informo: Anica Page (kontaktdetaloj inverse).
- 25 oktobro, 11atm-5ptm: Orienta Federacio – aŭtuna kunveno. Kvakera domo, Butts Lane, Maldon (provizore)
- 25 oktobro, 11atm-5ptm: Drondo en Londono, YMCA, 112 Gt Russell St. <http://espinfo.org/drondono>.

Aliaj anoncoj:

Prezentu ĉefprogrameron! Se vi havas taŭgan temon kiu amuzos aŭ informos klubanojn, ne hezitu proponi vin al la program-sekretario.

Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 23a oktobro por mencio en la sekva Kluba Bulteno.

7a Novembro: Diskuto pri nuklea (atomkerna) energio:

La historio de nuklea energio komenciĝas per la malkovroj pri radiaktiveco fine de la 19-a jarcento. La unua, kiu havis la ideon gajni energion el atomaj nukleoj, estis la sciencisto Albert Einstein (Ejnŝtejno) en 1905. Poste la scienca evoluo de la nuklea fiziko en la unua duono de la 20-a jarcento kondukis al la konstruo de la unua funkcia eksperimenta-demonstra reaktoro, fare de Enrico Fermi en Usono, la 2-an de decembro 1942 kaj al la fifamaj eventoj de la dua mondmilito, kun ĵeto de atomaj bomboj al Hiroŝimo kaj Nagasako. En 1961 Rusio eksperimentis pri la bombo *Car*, kun energio de 50 megatunoj (da TNT-ekvivalento), tio estas la 3.125-oblo de la bombo de Hiroŝimo.

Nur en la dua duono de la 20-a jarcento komenciĝas provoj gajni nuklean energion ankaŭ por civilaj celoj, por produktado de elektro. En 1954 estis konstruita la unua ŝipo nuklee movata, submarŝipo Nautilus (SSN-571). Dum surfacaj ŝipoj nuklee pelataj ne disvastiĝis, armeaj submaraj ŝipoj estas sukcesa ideo, ĉar dizelaj motoroj bezonas aeran oksigenon kaj ne estas uzablaj subakve.

(teksto el Vikipedio)

Rapida ŝerco.

Estis familio de rapoj -- paĉjo-rapo, panjo-rapo kaj filo-rapo.

Ĉe LLLL (t.e. La Londona Legomoj-Lernejo) demandis la instruisto al la gepatroj "Kial via filo ĉiam gajnas ĉe la konkursoj? Li venkas ĉiam ĉiujn aliajn legomojn!".

La gepatroj respondis "Nu, simple, rapido rapidas!"

Daniel Hayon

Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere ĉe Londona Irlanda Centro. Antaŭ la ĉefprogramero kaj dum la paŭzo klubanoj kutime amasiĝas en la komforta enirhalo por kaftrinki kaj babili.

Kutima programo:

18:00 malfermiĝo kaj bonvenigoj

19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero

20:15 - 20:45 paŭzo

20:45 - 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la ĉefprogramero

22:00 fino



Loko: London Irish Centre,
50-52 Camden Square, NW1 9XB
(tel: 020-7916 7272)

Metrostacio: Camden Town

Fervojo *London Overground*: Camden Road

Busoj: 29, 253, 274, 31.

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo:

<http://www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/lek>

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895;

Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346

rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo

020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.

Federacioj: Orienta: John Redgwell, 17 Dover Close, Braintree, Essex CM7 5TD; Sudorienta: Kevin Murray, 11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14 7HB 01932-345779 yarrump@gmail.com.

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Marjorie Boulton; Honoraj Vicprezidantoj: Valerie Atkinson, Husejn Al-Amily; Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Terry Page (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Matt Peperell, Olga Kerziouk, Antony Rawlinson (Program-sekretario kaj Bultenisto).

Adresoj: David Thornell: Esperanto, c/o London Irish Centre (adreso supre) lek.sekretario@gmail.com;

Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ ap_esp-lek21@yahoo.co.uk,

Terry kaj Anica Page: 7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP terry_page@btinternet.com, anica_page@btinternet.com,

Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.

Letero de nia Prezidanto

Karaj Klubanoj:

Reveninte de Esperantujo, kongresemaj samideanoj ĝuas dividi novaĵojn kun siaj lokuloj. Kompreneble! Ĉi-jare, tamen, malmultaj LEKanoj ĉeestis la

Universalan Kongreson en Bonaero, Argentino. Tial, ni ĉiuj sopiras sciiĝi pri ĝi. Se vi mem estis ĉe la 99a UK, bonvolu veni por prezenti raporton!

Tiu ĉi somero estis pli vigla por nia klubo, ol la antaŭaj du aŭ tri. Pli da klubanoj en la klubejo; pli da vizitoj. Bona surprizo estis tutronda sesio de **KVIN-MINUTAJ PRELEGETOJ**, certe pli energia kaj ĝuplena, ol oni atendis. La temo estis "Okulfrapaj Konstruaĵoj" - kaj tre interesaj memoroj elfluis el ĉiu ĉeestanto.

Ankaŭ okazis ĉi-somere multe pli da korespondado ol kutime kun eksterlandaj Esperantistoj, esprimantaj dezirojn partopreni LEKajn kunvenojn kaj eĉ gvidi ĉefprogramerojn. Ni esperas, ke la maksimuma nombro de ili ja sukcesos tion fari.

Fidela, bonhumora ĉeestanto kaj progresanto estas **DANIEL HAYON**. Dum lastatempa **SOCIA VESPERO**, ni diskutis ŝercojn. Daniel prezentis unu el siaj propraj, kiun li kreis laŭ tute Esperantlingva pensmaniero. Atentu ĝin, aliloke en tiu ĉi sama Bulteno - kaj sekvu lin! Sendu al la Bultenisto ja viajn ŝercojn, vortludojn kaj eĉ grafikaĵojn. Oni konsideros ilin serioze, por estonta apero ĉi tie. Ju pli da artisma aktivado, des pli vigla la Movado, ĉu ne? Certe!

Bonan aŭtunon!

David Thornell

